Universala Esperanto-Asocio (en oficialaj rilatoj kun UN kaj Unesko)
La 3-a Virtuala Kongreso de Esperanto • 24 – 27 novembro

# Facila Vento

23-a de novembro 2022, numero 1
Redaktas Dmitrij Ŝevĉenko kaj Anna Striganova

## Per flugiloj de facila vento

Dima Ŝevĉenko kaj Anna Striganova

*...Per flugiloj de facila vento*
*Nun de loko flugu ĝi al loko...*

***La Espero*. L. L. Zamenhof**

Karaj, ni salutas vin sur la paĝoj de la akompananta 3-an Virtualan Kongreson de Esperanto kaj Retoson kuriero, kiu nomiĝas *Facila Vento*... kaj vi jam preskaŭ aŭdas konatan muzikon, ĉu ne?



Ni tre ĝojas, ke tiu ĉi tria eldono de la Virtuala Kongreso iĝis por ni ankaŭ la tria fojo por sperti redakti la kongresan kurieron. Ĉu vi memoras kiel ĉio komenciĝis? Pandemio portis al ni bezonon de novaj rimedoj de komunikado. Prokrastigo de UK-oj kaj aliaj eventoj ktp... La mondo kaj ankaŭ Esperanto-movado vid-al-vide renkontiĝis kun novaj, antaŭe neniam ekzistantaj defioj. Sed la teamo de UEA sukcese trovis novajn rimedojn. Kaj ni ĝojas, ke ili funkcias ankaŭ en postpandemia epoko. Baldaŭ okazos la Inaŭguro de la 3-a VK kaj Retoso, kiu malfermos vican folion de la nova historio de la Esperanto-movado. Okazos aro da diversnivelaj programeroj, kiujn povos partopreni esperantistoj el ajna parto de la mondo.

Nia facila vento akompanos vin dum la tuta kongreso, kaj iom post ĝi por kolekti buntajn impresojn. Ne perdiĝi en fluo de buntaj kongresaj tagoj al vi ankaŭ helpos speciala Telegram-kanalo, Gazetaraj Komunikoj de UEA, Reta Revuo kaj paĝoj en la sociaj retoj.

Ne hezitu kontribui, ni estos tre ĝojaj ricevi kaj publikigi viajn anoncojn, ideojn kaj certe impresojn. Eble vi sukcesis kapti la plej belan ekranan foton de via ŝatata preleganto? Tiu arto ne pli facilas ol fotado! Kaj interalie, ne nur la VK mem, sed multo alia interesa kaj certe priesperanta povas iĝi temo de la artikoletoj, foje eĉ beletro! Kaj se la kontribuo estus plibeligita de viaj fotoj, bildoj kaj aliaj artaĵoj... Do, la vento de viaj kontribuoj enflugu en nian *Facilan Venton*, kaj ili ventece ĉirkaŭkovru la tutan mondon. Ja la VK allogas partoprenantoj de preskaŭ ĉiuj ĝiaj anguloj!

Ni ĝuu kaj sciu, ke nepoj nin benos!

## Jam aliĝis multaj homoj al la Virtuala Kongreso 2022!


## Rigardu kiom internacia kaj diversa estas la partoprenontaro!

**1443**
Mojosaj Homoj

**227**
Kaŝituloj

**86**
Diversaj Landoj

**Brazilo**
Plej granda aliĝintaro (126)



Farita de Martin: [https://martinrue.com](https://martinrue.com)


# Pilko de la Monda Pokalo

## Ekskluzivaĵo

Laŭ la informo de Yves Nevelsteen



Finfine pozitiva novaĵo pri la Monda Pokalo en Kataro: en interreto aperas fotoj de la oficiala Mondpokala balo "Al Rihla" kun Esperanta teksto: "FUTBALO ESTAS / PASIO - RESPEKTO / TEAMLABORO - HONESTECO / KOLEKTIVA - RESPONDECO". Ankoraŭ ne klaras, ĉu ĉi tiu Esperanta teksto efektive troviĝas sur ĉiuj pilkoj uzataj en la Monda Pokalo. Sed "pruvo" ja aperas en la retejo de Adidas, ekzemple.




# Virtuala Kongreso kune kun Retoso

Retoso estas la reta evento de TEJO organizita de junuloj kaj por junuloj, kiu okazos inter la 24-a kaj la 27-a de novembro. Ĝi donos al la homoj la eblon amuziĝi, lerni kaj renkontiĝi kun (novaj) amikoj en Esperantujo per la interreto.

Se vi ŝatas amuziĝi, ludi kvizojn, partopreni en prelegoj aŭ diskutrondoj, aŭ koncertumi: Retoso bonvenigas vin! La evento enhavas la plej malaĉan programon, tre diversan kaj plenan je koncertoj, atelieroj, prelegoj kaj interagaj programeroj.

Retoso estos vere tutmonda evento kaj partoprenebla por homoj ie ajn en la mondo. Ĝi havas programerojn en tempoj taŭgaj por homoj en Azio, Ameriko, Afriko, Oceanio kaj Eŭropo.

Pliaj detaloj: https://retoso2022.tejo.org

# Vidbabilejoj kaj Tekstbabilejoj

VK kaj Retoso enhavas ne nur oficialajn programerojn. Ekster programo vi povas partopreni Vidbabilejojn, kie eblas konatiĝi kun novaj homoj, babili en la neformala etoso.

Por tiuj, kiuj ŝatus babili, sed pro teknikaj kialoj ne povas partopreni Vidbabilejojn, ĉeestos Tekstbabilejoj, interalie donantaj tempon por vortigi siajn pensojn, uzante vortaron ;). Tekstbabilejo estas dividita je tri ĉambroj: Gastlibro, Demandejo, Retoso.

**Se vi ankoraŭ ne aliĝis al la 3-a VK kaj Retoso, nepre faru tion. La plej grava virtuala Esperanto-aranĝo de la jaro!**


**vk.esperanto.net**

# Spektu la koncerton de Yves Desrosiers

Yves Desrosiers estas prestiĝe premiita muzikisto de Kanado. Li komencis lerni Esperanton en decembro 2020 kaj jam en marto 2021 li lanĉis per virtuala koncerto sian albumon *Nokta ŝoforo*. Originale kaj la albumo kaj la muzikaĵoj havus titolojn en la angla, sed



Yves decidis por sia internacia laboro ekuzi Esperanton! Tiel ne nur la albumtitolo estas en Esperanto, sed same ĉiuj muzikaĵoj en la albumo nomiĝas laŭ titolo en Esperanto, kaj la lasta muzikaĵo estas mem kanto en Esperanto. Post la albuma lanĉkoncerto Yves estis prezentita kaj intervjuita por la revuo *Kontakto*, sur kies kovrilo li aperis (n-ro 2 de 2021). La titolo de la intervjuo estas "Kuraĝa gesto". Se vi interesiĝas legi kaj ankoraŭ ne abonas *Kontakton*, eblas tion fari rapide kaj simple per la abonilo. Poste li ankaŭ










aperis sur la kovrilo de la revuo *Esperanto* (majo de 2022). Yves prezentiĝis dum la 107-a Universala Kongreso de Esperanto, en Montrealo, kaj ankaŭ la partoprenantoj de la 3-a Virtuala Kongreso povas nun ĝui lian koncerton!


# Teknikaj demandoj kaj instrukcioj

Ĉiuj aliĝintoj ricevis mesaĝon kun la temlinio *VK+Retoso 2022: viaj ensalutdatumoj por la platformo de VK*. Ĝi enhavas ensalutajn datumojn por eniri la sistemon de Retevent. Se vi aliĝis, sed ne ricevis la mesaĝon, bonvolu kontroli aliajn dosierujojn de via retpoŝtkesto, kiel "reklamaĵoj", "spamo" ktp. Se vi tutegale ne trovas, bonvolu kontakti la organizan teamon.

Detala instrukcio troviĝas ĉe https://vk.retevent.com/instrukcioj.




La instrua video, kiu klarigas kelkajn bazajn funkciojn, spektu ĝin por ekscii detalojn. (Rimarko: la video estas sen sono): https://www.youtube.com/watch?v=Ohkx17Lp0Z8.





La programo kaj ĉiuj gravaj anoncoj de VK aperos en la VK-platformo. Sed aldone ni uzos ankaŭ aliajn rimedojn.

Se vi bezonas teknikan helpon pri la VK kaj Retoso 2022 bv. skribi al *info@vk.esperanto.net*.

# Riĉa scienca programo dum la Virtuala Kongreso, Scienca Konkurso kaj senpaga IKU-libro

La 3-a Virtuala Kongreso de Esperanto havos riĉan sciencan kaj fakan programon. Estos prezentitaj ĉiuj prelegoj de la Internacia Kongresa Universitato (IKU) kaj de la Scienca Kafejo (SK) okazintaj en Montrealo, iuj eĉ en plibonigitaj versioj, eventuale eblos diskuti kun la prelegantoj kaj fari demandojn realtempe.









Kadre de Retoso kaj VK3, TEJO kunlabore kun ILEI kaj UEA, lanĉas novan konkurson por junaj esploristoj: KonSciU, la Konkurso por junaj Sciencistoj kaj Universitatanoj. Ĝi celas individuajn membrojn de TEJO kiuj esploris pri iu fako (ekde la bakalaŭra ĝis la doktora nivelo). Ne necesas esti sciencisto aŭ esploristo laŭ profesio. Oni prezentos dum tri minutoj sian esploron kaj ricevos diplomon kaj eventuale premiojn.




Reta versio de la IKU-libro de 2022, kun 16 tekstoj de la IKU- kaj SK-prelegoj de Montrealo kaj pliaj tekstoj kaj resumoj de la Scienca Universitata Sesio de Akademio Internacia de la Sciencoj, okazintaj dum BET-56 en Litovio, estas nun havebla senpage ĉe http://iku3.trovu.com/. Daŭre estas aĉetebla la papera versio, ĉe la Libroservo de UEA.

## Sekvu novaĵojn kaj partoprenu diskutojn pri la Virtuala Kongreso en Telegram-grupo: https://vk.telegramo.org

Vi povas esti aŭtoro de *Facila Vento* kaj la Reta Revuo! Por kontribui, skribu al la redakcio *revuo.esperanto@gmail.com*

## Aperis la decembra numero de la revuo *Esperanto*

### La enhavlisto de la decembra numero:





243 | Survoje al Strategia Planado. Kio plej gravas?
246 | La ĉefurbo de Alpoj
247 | Historio | Rete. La revojaĝo de Lucien Péraire
248 | Fake, Science kaj Profesie tra la mondo: Science riĉa Virtuala Kongreso, novaj spacprojektoj de NASA kaj la klimata kulmino en Egiptio
250 | AMO: 15 AMO-seminarioj ene de unu jaro
251 | Kulturo: Freŝan venton por impetoj de "Impeto". Esperanta eldonejo 30-jariĝis
252 | Interparolo kun Chelsea Rae Moses
254 | La 109-a Japana Esperanto-Kongreso okazis hibride
256 | UEA | Afriko brilas: La konsisto de la nova Afrika Komisiono de UEA (2022-2025)
256 | Oficiala Informilo
257 | Landa agado: Ora geedziĝo
258 | Recenzo: Verko polemika, sed kuraĝa
259 | Laste Aperis
260 | Historio: Ivan Ŝirjaev: novaj biografiaj informoj
262 | Indekso
263 | Forpaso